

EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro



Nia aganto pri
instruado kaj
progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj



EKO 2023 / 42. Julio 19 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Kunlaborantoj (lingva kontrolo): Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Gbeglo Koffi.

Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 380 KB. Sume: 420 KB.

Temas nur pri PDF, kiun SMG mem alkroĉis. La pezo de aŭtomate kreitaj PDF ne estas anticipe koneblaj.

La Tago de Esperanto baldaŭ okazos

Du semajnojn antaŭ la 26-a de julio 2023, kiam la esperantistoj en la tuta mondo festos okaze de la 136-a naskiĝdatreveno de sia lingvo, en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* aperis artikolo de Humphrey Tonkin pri la Esperanto-Tago 2023. La honora prezidanto de UEA demandis sin: "Kion vi faros okaze de tiu tago?" kaj mem respondis ĉi tiun demandon. Sed kion vi faros? Legu kaj respondu!

<https://sezonoj.ru/2023/07/esperanto-tago-2/>

Vidu ankaŭ en <uea.facila>: <https://uea.facila.org/artikoloj/movado/esperanto-tago-2023-r376/>

Portugala kurso por afrikanoj

Kurso senpaga pri la internacia lingvo Esperanto por portugalingvaj afrikanoj komenciĝos la 2-an de aŭgusto 2023 per Vacapo. Instruas Miguel Bento. Interesiĝantoj aliĝu per mesaĝo al <miguelbento@gmail.com>.

Alternativa aliĝo estas per reta aliĝilo: <https://mallonge.net/paek2023>

La portugala estas lingvo uzata en Angolo, Mozambiko kaj Kabo-Verda.

Kurso pri Esperanto en la franca por komencantoj

Instruisto: ESPOIR NGOMA KASATI

Retadreso: espoirkasati@gmail.com; Vacap-numero: (+243) 972 716 042

La kurso okazos per la franca (do, celas ĉiujn franclingvajn afrikanojn)

- La kursoj komenciĝos la 2-an aŭgusto 2023
- La nivelo estas A1 kaj A2 (veraj komencantoj)
- Ĝi okazos per Vacapo kaj fine de ĉiu ĉapitro okazos Zoom-renkontiĝo por kunpraktikado de la lingvo.

ESF liveras tri artikolojn: muzeo, vortaro, lernolibroj

Jen la plej lastatempa artikolo aperinta en la blogo ESF Connected:

Bernhard Tuidar: [Nova aŭdqvidilo por la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko](https://esfconnected.org/2023/06/30/nova-auxdqvidilo/)
<https://esfconnected.org/2023/06/30/nova-auxdqvidilo/>

Bertilo Wennergren: [Ĝisdatigo pri la Tekstaro kaj PIV](https://esfconnected.org/2023/05/19/gisdatigo-pri-la-tekstaro-kaj-piv/)
<https://esfconnected.org/2023/05/19/gisdatigo-pri-la-tekstaro-kaj-piv/>

Carolien Stolte: [La Esperantaj Lernolibroj Kiuj Neniam Estis](https://esfconnected.org/2023/04/05/la-esperantaj-lernolibroj-kiuj-neniam-estis/)
<https://esfconnected.org/2023/04/05/la-esperantaj-lernolibroj-kiuj-neniam-estis/>

UEA facila: fonto de utilaj informoj facile digesteblaj

Jen kiel UEA subtenas la novajn lernantojn. La retejo <UEA facila> estas sub la prizorgo de Anna Löwenstein. Jen lastaj aldonoj al la servo.

<https://uea.facila.org/artikoloj/kongresoj-kaj-kunvenoj/esperanto-uzata-%C4%89e-un-r372/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/movado/%C4%89u-balda%C5%AD-estos-nova-esperanto-urbo-r373/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/movado/naturismo-kaj-esperanto-havas-komunajn-valorojn-r374/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/homoj/tina-modotti-fotistino-kaj-aktivulino-r375/>

Granda pomo preta por nia manĝo

Bertilo Wennergren diskonigis, ke li ĵus lanĉis version 15.4 de PMEG (Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko) sub la nomo PMEG 2023.

Ĝi estas havebla en la ordinara versio interreta, kaj ankaŭ elŝutebla kiel HTML kaj kiel PDF.

Legi la eldonaĵon: <https://bertilow.com/pmeg/menuo.html>

Elŝuti la eldonaĵon: <https://bertilow.com/pmeg/elshutebla/>

Bertilo ĉe Facebook: <https://www.facebook.com/bertilo.wennergren>

Sendis: Barta Zoltán, Hungario

Resume pri sumoo

La 82-a Internacia Esperanto-Sumoo daŭros ĝis la 23-a de julio. En la sumoo vi povos legi Esperanto-libron kun 300 esperantistoj el 35 landoj. Ĝi estas grandioza projekto, kiu progresigas nian movadon. Vidu: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>

HORI Jasuo, Retadreso: horizonto@r.water.sannet.ne.jp

AMO 101 sukcese okazis

La AMO-programo bonvenigas ankoraŭ unu landon: Latvion! Tiu seminario okazis en la 18-a de julio en Ventspils. Partoprenis surloke dudeko da homoj en Latvio, 10 en Zagrebo kaj plia deko rete el multaj landoj, inkluzive de du afrikaj landoj. Sekvos pli detala raporto.

Kurso pri Esperanto kaj afrika kulturo por progresantoj

Instruisto: Renato Corsetti; retadreso: renato@esperanto.org

La kurso okazos per Esperanto ekde la 16-a de septembro 2023. La nivelo estas B1 kaj B2 (bonaj parolantoj). Ĝi okazos per Zoom, unu horon semajne. Ekzistas ebleco ricevi post ekzameno ateston de ILEI kaj de la Universitato Espoir laŭ aparta antaŭaranĝo.

Unekso-Kuriero havebla

La plej lasta kuriero (januaro-marto 2023) estas elŝutebla de la retejo de Unesko. La numero, kiu temas pri matematiko estas legebla kaj elŝutebla en la adreso: https://unesdoc.unesco.org/ark:/48223/pf0000384081_epo

La elŝuto okazas el la retejo de Unesko, por ke oni konstata la popularecon de la Kuriero inter esperantistoj.

La proceduro por elŝuto aspektas iomete komplika, ĉar en "Full Text" vi devas klaki la ikonon kun sago malsupren, kaj poste konfirmi kun ĉiuj paĝoj, por akiri la pdf-on, sed la revuo ja meritas la penon. Ligiloj al antaŭaj numeroj aperas en la retejo de UEA ĉe: https://uea.org/revuoj/unesco_kuriero

Prezidanto de ILEI en itala radio

D-ro Ahmad Mamduhi el Irano estis intervjuita de itala ret-radio.

<http://www.shareradio.it/notizie-dal-mondo-esperantista-intervista-ahmad-reza-mamduhi-presidente-della-internacia-ligo-instruistoj/>

Sendis: Alessandra Madella

Nepalaj datoj

En EKO 39 ni raportis detale pri la sekva turisma evento en Nepalo. Sed ni ne donis la datojn. La programo okazos inter la 26-a de februaro kaj la 8-a de marto, 2024.

Ĉu eblos proponi ion al Erasmus+?

Estas nova programo de Erasmus+, kiu prezentas specifajn avantaĝojn por kursoj laŭ la Eŭropa Kredit-Transiga Sistema (EKTS/ECTS) pri aŭ en Esperanto el kiu ajn fako. Ĝi solvas la problemon ke ni preskaŭ neniam havas sufiĉe da studentoj en nur unu universitato. La BIP-programo (inkluzive de invitado de kolegoj) estas financata de tiu speciala programo (6-8.000 € jare) kaj la vojaĝ- kaj restad-kostoj de la studentoj de Erasmus + (po 70 € tage).

Ĝi estas malferma al ĉiuj studentoj kun minimume bakelaŭra grado el kiu ajn universitato el kiu ajn lando.

Tiuj kursoj devas esti iniciatitaj de 3 universitatoj en 3 diversaj landoj (minimume) kaj enteni regulan retan instruadon kaj surlokan kurson (inter 5 kaj 30 tagoj). Devas partopreni minimume 15 studentoj. Vi trovas informojn chi tie:

<https://wikis.ec.europa.eu/display/NAITDOC/Blended+Intensive+Programmes+in+KA131+Higher+Education+projects>

kaj en multaj aliaj lokoj en la reto.

Pascal Dubourg Glatigny

SMG: BIP estas mallongigo anglalingva: 'Blended Intensive Programmes' La projekto nepre venu al diskuto en la universitata ret-grupo, kiu kunsidas ĉiu-monate.

Raciigo de la revua situacio en Kanado

Iam antaŭe mi sendis al pluraj el vi la numerojn de *La Riverego*, la revuo de Esperanto-Societo Kebekia. Nun *La Riverego* kuniĝis kun *Lumo*, la revuo de Kanada Esperanto-Asocio, kaj do estas unu revuo (*Lumo*), de du asocioj: KEA kaj ESK. Tiu ĉi numero estas bunta kaj varia, kaj muzikamantoj trovos ĝin aparte interesa.

https://esperanto.ca/wp-content/uploads/2023/07/Lumo_2023_1-fina.pdf

Notu ke la plej fruaj numeroj de *Lumo* (1902-1904) kaj plej lastaj (2009-2023) estas haveblaj en la retejo de KEA (esperanto.ca). Ĝis nun *Lumo* estis havebla nur al la membroj de Kanada Esperanto-Asocio, sed nun ĝi estas alirebla por la tuta mondo. Notu aparte la antaŭlastan almanakan numeron de *Lumo*, kiu aparte pritraktas la pasintjaran UK-on, aparte la novan originalan teatraĵon "1910" (atendatan venontjare libroforme).



Jenja Amis, la redaktoro

Vojoŝanĝa verko refoje havebla

Mi reeldonis: **Claude Piron: Esperanto - ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?**

Mendebla ekzemple jene:

<https://www.lulu.com/shop/claude-piron/esperanto-%C4%89u-e-%C5%ADropa-a-%C5%AD-azia-lingvo/paperback/product-74gjq5.html?q=Esperanto+-+%C4%89u&page=1&pageSize=4>

Vilhelmo Lutermano

SMG: La libroservo de UEA ja ne plu havas la verkon papere. Sed ĝi havas multajn aliajn verkojn de Claude Piron. Nur serĉu en la libroserva retejo.

Kien malaperis 'Laste aperis'?

Ĝi ne malaperis, vi devas nur trovi ĝin el inter la koboldoj de la reta ĝangalo:

<https://uea.org/aktuale/ls>

===== 960 vortoj =====

La kolekto de EKO por 2023:

<https://www.ilei.info/agado/EKO.php> (ĝis 40).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@e-gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.